

---

## 往生と転生

### *Renaskiĝo kaj Metempsiĝo*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

---

仏教は靈魂不説の宗教です。少なくとも、死後にも永続する精神的生命実体が存在するとはいいません。仏教の三法印の第一「諸行無常」、および第二「諸法無我」からしても、そのことは明らかです。

では、人間死んだら終わりか？

ある意味ではそのとおりです。肉体は焼かれ、元素に分解し、一部は大気に、一部は大地へと還元されます。これは自然の摂理です。一度分解された元素が再び集まって生命体に復活することはありません。すなわち、人は物質的存在としては、死ねばそれでおしまいです。

ただし、仏教が問題にしているのは、物質のことではありません。「物」と「者」は違うのです。者、すなわち人格的存在は消失しないのです。あえていうならば、人間は死んで、靈魂ではなくて業が残ります。

業、サンスクリット語で「カルマ」といいますが、簡単にいえば「行為、または行為の結果」のことです。仏教では三つのレベルの業を考えます。身業・口業・意業です。体で、言葉で、または心で、我々が何かを行う、そうしてその結果が後々に続いていくのです。ですから、行いに気を付けて、自分にも他人にも悪い結果を残さぬようにせよ、と教えられます。

Budhsimo diras nenion pri animo. Almenaŭ pri spirita viv-substanco, kia daŭre ekzistus senmorta. Tio estas klarigebla laŭ la unua kaj la dua el la tri darmaj sigeloj de budhismo: neniu ekzistaĵo estas konstanta, kaj neniu ekzistaĵo havas atmanon.

Do ĉu homo ne ekzistas post morto?

Iusence, jes. Homa korpo bruliĝas, malkombiniĝas en elementojn kaj reduktiĝas en aeron kaj teron. Tio estas natura providenco. Ne povas esti, ke disigitaj elementoj ree sin kombinas kaj reenkariniĝas en vivan korpon. Nome, homo kiel materia ekzistaĵo venigas finon post morto.

Sed budhismo ne temas pri materio. Materio kaj Persono ne identas. Persono ne malaperas. Se tiel diri, post homa morto restas ne animo aŭ atmano sed karmo.

Karmo, sanskrite karma, signifas agon, aŭ rezulton kaj rekompenccon de ago. Budhismo klasifikas karmon en tri nivelojn: korpa, parola kaj konscia karmoj. Ni agas per nia korpo, aŭ per nia lingvo, aŭ per nia koro; ĝia rezulto sekvas kaj sekvas senfine. Tial ni devas atente konduti kaj ne lasi malbonan rezulton al ni mem kaj aliaj homoj; jen la instruo de budho.

靈魂が存在しないならば、何が浄土へ往生するのか、と問われた方がいます。もっともな疑問です。実際、多くの方が靈魂転生と浄土往生を混同しておられます。肉体が減んで靈魂があつた世たる浄土へ転生する、というのは分かり易い、ですがそれは仏教の覚りとは関係のないはなしです。仏教において大切なのは自覚であり、道理を見通す智慧であります。さとりの世界を浄土といい、自覚において転ぜられた人格(者)が進むべき方向です。往生とは求道の歩みそのもので、死とはその歩みが完成されたということです。

一方、転生とはしよせん迷いの境涯です。たとえ天国に生まれ変わって幸福になったとしても、天国の住民である神にも寿命があり、寿命が尽きれば地獄に落ちる可能性さえあります。誤解している人が多いのですが、極楽と天国は違います。極楽の対極にあるのは娑婆であり、天国の対極にあるのは地獄です。天・人・阿修羅・畜生・餓鬼・地獄の六領域をまとめて娑婆といいます。娑婆(忍土)とは一切皆苦の世界です。

天国=神々の世界にも様々な罪悪があります。ゆえに、仏教徒がめざす方向は天国ではなく極楽浄土=覚りの世界であります。

Se ne ekzistas animo, kio renaskiĝas en la Pura Lando? Tiel iu demandis min. Ja rezonebla demando. Efektive multaj konfuzas renaskiĝon en la Pura Lando kun metempsikozo de animo. Se oni diras, ke animo iras al la Pura Lando aŭ la postmorta mondo post malapero de korpo, oni facile komprenas tion. Sed tio tute ne rilatas al budhisma vervekiĝo. En budhismo gravas memkonscio kaj saĝo, kiu travidas aferojn laŭ leĝoj. La Pura Lando estas la mondo de iluminiĝo, aŭ la celo, al kiu sin-turnigitoj en memkonscio devas sin direkti. Renaskiĝo estas nenio alia ol paŝo vojserĉanta, kaj morto plenumas la paŝon.

Aliflanke, metempsikozo okazas nur en la sferoj de ne-iluminiĝo. Eĉ kiam oni reenkariniĝas kaj iĝas feliĉa en paradizo, loĝantoj - dioj - devas iam fini sian vivon kaj denove povas fali eĉ en narakon. Paradizo ne estas purlando aŭ sukavato. La malo de purlando estas saha, kiu entenas la ses sferojn de paradizo, homo, asuro, besto, malsatulo kaj narako. Saha estas la mondo, kie ĉio estas suferiga.

Ankaŭ en paradizo - la mondo de dio - oni ne malhavas diversajn pekojn; tial budhanoj sin direktas ne al paradizo sed al la Pura Lando aŭ sukavato, la mondo de vervekiĝo.